D E K L A R A C I O

SAT KONGRESO

AŭGSBURGO

Deklaracio

La 70-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazinta de la 2-a ĝis la 9-a de Aŭgusto 1997 en Aŭgsburgo, en kiu partoprenis 133 reprezentantoj :

- Invitas la esperantistajn asociojn konigi siajn celojn al la eŭropaj deputitoj, membroj de progresemaj partioj,
- Esprimas sian solidarecon kun la alĝeria popolo, ĉefe la virinoj, viktimoj de terura integrismo. SAT solidare eldonis la libron VUALO DE L' SILENTO, verkita de aŭtorino Ĝura
- Invitas la esperantistajn asociojn konigi siajn celojn al la eŭropaj deputitoj, membroj de progresemaj partioj,
- Kondamnas ĉiujn masakrojn, kiuj okazis en Demokratia Kongo laŭ etnaj kriterioj.
- Asertas, ke la palestina popolo rajtas havi sian propran þtaton por vivi en paco kun Izraelio, kies politiko de kolonigado estas kondamnenda.
- Rifuzas elekti inter la sistemo bazita sur liberalismo kaj sistemo fondita sur tutŝtatismo sed favoras la spertojn krei socian kaj huimanan ekonomion, kiel ekzemple faras la grupoj S.I.L. (Sistemo de Interŝanĝoj Lokaj).
- Konstatas, ke pli kaj pli kreskas la senlaboro en la tuta mondo kaj negative efikas la ĝis nun provitaj solvoj de la ŝtatoj malrespekte la Homaj Rajtoj,
- Invitas ĉiujn laboristojn kadre de asocioj al uzado de Esperanto kaj starigo de kursoj, cele al rektaj kontaktoj kun laboristoj el al tuta mondo.
- Fondas siajn proponojn sur la prinfcipo Anstataŭ disdoni la mizeron, disdoni la riĉecon.
- Proponas tujan gravan redukton de la labordaŭro sen redukto de la salajro.
- Konstatas, ke tutmondigo de ekonomio konduikas al tutmondiĝo de la socialaj problemoj (bona ekzemplo estas la konflikto en Firmao Renault en Vilvordo) kaj al la necese internaciaj reagoj de la laborista klaso.